nia voĉo

madrida esperanto-liceo aprilo 2014

## TAGO DE LA LIBRO

La venontan dimanĉon 27an de aprilo oni celebros la Tagon de la Libro en la Junulargastejo de San Fermín (Avda. de los Fueros, 36, metrostacio San Fermín-Orcasur). Kiel pasintjare oni invitis al MEL por partopreni en la agado, ĉikaze per la prezentado de la libro "Poezio: armilo ŝargita per futuro" de Miguel Fernández. La prezentado okazos en la hispana kaj oni deklamos poeziaĵojn en Esperanto, la hispana, la rusa, la pola kaj aliaj lingvoj. Ĝi komenciĝos je la 11:00 per festa procesio gvidata de *"La Banda Trovada"* kaj la libroprezento okazos je la 11:30. Poste oni organizos aktivaĵojn por infana publiko. La Tago de la Libro fariĝos ankaŭ batalema aktivado ĉar oni postulos al la Distriktestraro de Usera ke ĝi plenumu sian promeson konstrui bibliotekon en kvartalo San Fermín, kion la loĝantoj atendas de pluraj jaroj.

MEL partoprenos la kutiman legadon de "Donkiĥoto" en la kulturcentro *Círculo de Bellas Artes* de Madrido, kiu disvolviĝas dum la tagoj ĉirkaŭ la Librotago. Konkrete ni legos en Esperanto la 24-an de aprilo, ĵaŭde, je la 19 horo. Se vi mem emas legi la tekston, bv. kontakti la redakcion de Nia Voĉo por interkonsenti; novuloj havos prioritaton ĉijare.

## EKSPOZICIO EN NACIA BIBLIOTEKO

Se vi havas la okazon, ne maltrafu novan ekspozicion en la Nacia Biblioteko: "Visite España, la memoria rescatada". En ĝi troviĝas du libroj rilataj al nia movado:

- Hispanujo (dispublikigo kaj propagando) / F.J. Sánchez Cantón; (tradukis Hispana Esperanto-Asocio).-Madrid, 1926
- Sevilla / Comité de Iniciativas y Turismo – Sevilla, 1928 (donaco de Hispana Esperanto-Federacio al la Nacia Biblioteko)

Pliaj informoj pri la ekspozicio: http://bit.ly/Mc9Z1X

## MADRIDANOJ EN EKSTERHISPANIAJ PROJEKTOJ

Kuba esperantisto loĝanta en Madrido, Andy Hernández, estis selektita de la Esperanto-grupo de Tuluzo por ties kampanjo de varbado en la regiono. Li volontulos dum du monatoj majo-junio kie li instruos Esperanton, diskonigos la lingvon kaj la regionan asocion en lingvofoiro, vizitos regionajn klubojn, organizos aliajn aranĝojn, ktp.




Nia samurbano Diego Grande nun troviĝas en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo en Germanio, kiel staĝanto kadre de Grundtvig-projekto. Li kunlaboras ĉe Biblioteko kaj Arkivo de Germana Esperanto-Centro (Interkultura Centro Herzberg), unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj kaj arkivoj, kiu ĉijare prepariĝas al 10-jara jubileo.

Nia samurbano Darío Rodríguez ricevis diplomon de omaĝo fare de esperantistoj el Ĉinio. Ĝin peris nia asociano Augusto Casquero, kiu nun instruas en tiu lando, kaj ĝin transdonis en nia sidejo la prezidanto de MEL Manolo Parra. Foton de la transdono oni povas vidi apude.

## RADIA BONVENO AL LA PRINTEMPO

La alternativa radiostacio Radio Vallekas elsendis dimanĉon la 16an de marto je la 17 horo, programon dulingvan, hispane kaj esperante, por bonvenigi la printempon, dum iom pli ol unu tuta horo. En ĝi partoprenis Miguel Fernández, kiu prezentis diversajn pecojn kaj deklamis poemojn, kaj la Kvaropo Sinkopo, kiu kantis en Esperanto kaj en aliaj lingvoj. Eblis aŭskulti ĝin rekte en la sidejo de la stacio, en la madrida kvartalo Vallekas'.

Jen la programo, por aŭskulti iam ajn: http://www.ivoox.com/hora-impia-programa-16-03-14-concierto-bienvenida-la-audios-mp3_rf_2927930_1.html. Ĝi troviĝas ankaŭ en la Bitoteko de HEF: http://www.esperanto.es/jspui/handle/11013/4360

Ĝi estas unu el la diversaj programoj kiujn la anarkiisma grupo Volia de la asocio FAI organizis kaj intencas plu organizi dum la sekva periodo, kunlabore kun SAT-en-Hispanio. Ekzemple, la 2-an de marto, Miguel Fernández deklamis la poemon *"Grito hacia Roma"* (Krio al Romo) de Federico García Lorca kadre de la sama radio-programo *"La hora impía"* (La malpia horo), kiu tiutage, esceptokaze, estis emisiata el la okupata socia centro *"La Casika"* de Móstoles (nuntempe, post 16 jara memmastrumado flanke de popolaj kolektivoj, grave minacata pro eldomigo-premoj) kadre de tutsemajnfina emisiado fare de liberaj (sub kontrolo de nek la ŝtato nek privataj komercaj entreprenoj) radio-stacioj. Jen fotoj de la okazaĵo http://www.ipernity.com/doc/28525/album/626253.

## HISPANA KONGRESO

En la retejo de la Hispana Kongreso de Esperanto en Arundo (Ronda) eblas trovi jam la Provizoran Programon de la renkonto. La partoprenantoj povos ĝui grandan variecon de prelegoj, turismaj aktivaĵoj, laborkunsidoj, libroprezentadoj, amuzaĵoj, teatro, muziko, ktp.

En la momento de pretigo de tiu ĉi bulteno jam aliĝis al la renkonto preskaŭ 120 homoj el Hispanio kaj aliaj proksimaj landoj.

Eblas koni ĉiujn detalojn pri tiu renkonto ĉe http://arundakongreso2014.wordpress.com/.

## EKSTERORDINARA KUNVENO DE MEL

Post la prezento de la nova Statuto de Madrida Esperanto-Liceo antaŭ la institucioj respondecaj pri kontrolo de asocioj en la regiono, oni postulis de ni malgrandajn ŝanĝojn en la teksto. Oni do devos baldaŭ kunvoki eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon de la asocio. Membroj de Liceo ricevos la kunvokon oficiale.

## VENONTAJ KUNVENOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL, plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

Ankaŭ plu daŭras la kutimaj babilrondoj la unuajn sabatojn de ĉiu monato. La venonta okazos la 5-an de aprilo, je la 17,30, en drinkejo *"100 montaditos"* de Placo Santa Ana (atentu!, ĉar ŝanĝiĝis la loko)

Krome, por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj kaj detaloj pri renkontoj kaj aliaj, vizitu regule la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ kaj la retejon de MEL ĉe la adreso http://www.esperanto.es/mel. Ankaŭ la Fejsbuka forumo por esperantistaj madridanoj https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/ taŭgas por informoj kaj rendevuoj.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com